ESPERANTO-MOVADO HODIAŬ EN ĈINIO

Omaĝe al REU-Zoom-Renkontiĝo la 16a de Marto 2024

Preleganto: sro Ĉielismo WANG Tianyi

Honora prezidanto de Xi’an-a Esperanto-Asocio, Ĉinio

chielismo@qq.com

Konciza historio de la ĉina E-movado

1, En 1905 Ŝanhajon vizitis rusa komercisto, kaj instruis al oficisto LU Ĉiĉin(陆疾侵) de komerca firmao en la havena urbo. Ĝis nun ni ne scias, kiu estas la rusa komercisto? Ankaŭ kio estas biografio de LU Ĉiĉin, kiu eldonis ĉina-Esp-lernolibron 爱斯不难读(Es-ne-malfacila lego), kaj fondis grupon Esperantista Grupo Ŝanhajo en 1906.

2, En 1908 ĉinaj studentoj inkluzive sron Lusun(鲁迅) lernis Esperanton ĉe japapa anarkiisto Oosuki Sakae(大杉荣). Poste la ĉinaj studentoj kondukis al Ĉinio la japanan Esperanto-nomon 世界语（Mondlingo）,kiu estas uzita ĝis hodiaŭ en Ĉinio, kvakam la japano jam ne uzas tiun nomon. La fonetika nomo Esperanto ne estas konata en la ĉina lingvo, la Mondlingvo(世界语) estas oficiala nomo.



3, En 1920 Sergej Aleksandroviĉ Polevoj rusa profesoro en Tianjin apud Pekino legis ĉinan Esperanto-revuon “La Voĉo de l’ Popolo” eldonitan en Ŝanhajo kaj skribis al la redakcio, prezentinte sin bolŝevisto loĝanta en la norda Ĉinio. Polevoj skribis ke pro legi la Esperanto-revuon li sciis ke tuj post la 1911-jara revolucio ekzistas liberaj socialistoj... Li kredas ke la bolŝvisto-gvidanto de la rusa sovetio ne estu malkonataj al la ĉinaj liberaj socialistoj, kaj eble ĉinaj liberaj socialistoj deziras kunlabori kun la bolŝvisto...”. Ricevinte la leteron, revua deĵoranto Zheng Peigang(郑佩刚) transsendis la Esperantan leteron al Huang Chaohai(黄超海) studento de Pekina Universitato, petante aranĝi rendevuon kun famaj socialistoj surloke. La studento aranĝis rendevuojn kelkfoje inter Polevoj kaj Chen Duxiu(陈独秀) - LI Dazhao(李大钊), kiuj du poste estis fondintoj de la ĉina komunista partio. Pro tio oni diras ke Esperanto estis naskihelpanto de la Ĉina Komunista Partio.

La Voĉo de l’Popolo

Ĉiusemajna Ĥina kaj Esperanta gazeto, pri ĉio, kio kondukas socian revolucion kaj progresigas universalan unuiĝon.

JARABONO
Ĥinujo.....Sm. 1,00
Alilando.....Sm. 2,50
(unu numero: Sd. 5)

REKLAMO
Unu linio.....Sd. 10
Korespondado,unu enskribo.....Sd. 10

PAGMANIERO
La Administacio, krom en Canton elpageblajn poŝtmandatojn, akceptas respondkuponojn aŭ ĥinajn poŝtmarkojn kiel pagilojn, sed nepre rifuzas alilandajn poŝtmarkojn.

Ia jaro 27 Augusto 1913 No.2

Redakcio kaj Administracio:
Sifo, 8, Chiin-Sin Tung Str., Sai-Kwan, Canton (Ĥinujo)

SOCIALISTOJ EN ĤINLANDO

4, Esperanto kontribuis al la ĉina fonetika skriblingvo “Hanyu Pinyin”
Pasintece en Ĉinio ekzistis diversaj fonnetikaj skriboj, tamen hodiaŭ tutlande uzita fonetika litero deveins de Esperanto. Pri tio iama Gvidinto ĈJU Ĉubaj(瞿秋白) eldonis sian projekton pri venonta ĉina fonetika litero en 1932, proponante: Literoj de nova ĉina skriblingvo prenos Esperantajn literojn kiel sian preskaŭ normon…… Kaj la nova ĉina skriblingvo ankaŭ estos nomita Esperantigita ĉina skribolingvo. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949, lia projekto estis praktike realigita de ĉinaj eistoj, kiuj tiam regis la ĉinan lingvokomitaton.

5, Esperanto influis modernan literaturan lingvon de Ĉinio.
Tradicia ĉina literatura lingvo ne havas regulan gramatikon,sed nuna literatura lingvo havas tre regulan gramatikon, kiun influis famaj literaturistoj kiel Lusun(鲁迅)、Bakin(巴金) k.a. nomitaj kiel mal-dekstraj verkistoj,kiuj fakte plejparte estas esperantistoj en la pasinta jarcento. Pri tio fama verkisto Ĝinjon(金庸) en Honkono diris Strange, Bakin havas stilon ne de la ĉina, ankaŭ ne de la angla, kiun mi konas. Fakte, li ne scias ke dum la juneco Bakin estis profesia Instruisto de Esperanto ĉe Ŝanhaja Esperanto-Asocio……



6, Dum 1949 -1989 de la nova Ĉinio la ĉina EM estis forte influita de la centra registaro, kie oficas malnovaj eistoj kiel altranguloj, kiuj ĉiam kaptis ŝancojn puŝi E-disvastigon. Ĝia standardo estis sro Hujusz(胡愈之), kiun prezidento Mao nomis sro Ŝiĝjieju(Mondlingvo). Lia vojaĝimpresa libreto “Impresoj pri Moskvo” eldonita en 1932 donis al ĉinaj intelektuloj fortan alvokon, kaj en unu jaro represis 5 fojojn, kaj multe da junaj studentoj aliĝis al la ĉina komunista partio. Sur la unuapaĝo li esperante skribis:”Al Moskvaj gekamaradoj,kiuj volonte gastigis, helpadis, gvidadis min dum mia vizito de la ĉefurbo de tutmonda proletaro, mi dediĉas tiun ĉi libreton.”

1951 年 3 月 11 日中华全国世界语协会宣告成立， 会后与会者合影。
En la 11-a de marto 1951, fondiĝis la Ĉina Esperanto- Ligo. Jen partoprenantoj de la fonda kunveno.

7, Ĉina Esperanto-Ligo fondiĝis la 11an de Marto 1951. Kaj en 1963 generalo vicĉefministro CHEN Yi vizitis Esperanto-ekspozicion kaj ĉeestis la Esperanto-laboran kunsidon… Poste okazis Esperanto-instruista kurso en Pekino. En 1964 la ĉina radio internacia komencis dissendi Esperanton, la reorganizita redakcio reeldonis la gazeton El Popola Ĉinio……

8, En 1979 okazis la dua Esperanto-labora kunsido en Pekino, poste la centra oficejo sendis al siaj sistemoj la ordonon fondi la Esperanto-organizon en diversaj urboj. Pro diversaj kialoj en okdekaj jaroj okazis la ĉina Esperanto-prosperego ke naskitaj Esp-asocioj troviĝis tra Ĉinio kaj ĉ. Esperanto havis Kelkcent mil kursanojn tra Ĉinio, kaj atingis la pinton en 1986, kiam okazis la 71a UK en Pekino.

1981 年 12 月中国世界语之友会成立大会现场
Kunveno por fondo de la Ĉina Societo de Amikoj de Esperanto en decembro 1981

Post la pinto en 1986 la prospero daŭras ankoraŭ 10 jarojn ĝis 2004, kiam okazis la 89a UK en Pekino. Lastajn jarojn ĝis 2020 la ĉina Esperanto falis antaŭ peza premo de la angla lingvo ke pli ol 80% da E-asocioj malaperis tra Ĉinio, kaj E-kursoj estis raraj en la socio. Malgraŭ la malfacila situacio la ĉina landa kongreso okazis regula ĉ.300 aliĝantoj. Nome de IKEF kaj ILEI aktivas, eĉ IKEF-CN gvidas aplikadon de la monda Esperanto.

9, Kio estas nuna Esperanto-Movado en Ĉinio?

9.1, Ĝenerale Esperanto jam pasis plej malfacilan tempon,ĉar la angla lingvo jam pasis sian pinton kaj perdis sian superpotencon kontraŭ iuj lingvoj. Iuj junuloj komencas turni al aliaj lingvoj ankaŭ Esperanto. Kvankam tiuj junuloj ne preferas aliĝi al tradicia Movado kiel asocioj, tamen ili aktivas interrete kaj individue.

9.2, Ĉinio hodiaŭ proponas sian projekton “Homarofutura komunumo”. Tiu ideo esence kongruas kun ideo de Esperanto, ĉar la homarofutura komunumo estas supernacia ke neniu nacia lingvo konformas kun ĝia formato krom Esperanto(Mondlingvo) konformas. Ŝajnas ke tio estas historia ŝanco por Esperanto, sed ĉu la ĉina esperantisto povos kapti la ŝancon? Mi ne scias, ĉar nun la ĉina esperantistaro estas maljuna kaj malforta.

9.3, Instruado de Esperanto en lernejoj: Nur en Univ. Zaozhuang estas Esperanto-baka-laŭra studado por 4 jaroj, en iuj kolegioj Eo estas nedeviga leciono por 2 poentoj dum studa jaro.Nur en Elementa lernejo Baiyangshujie Esperanto estas deviga kiel lerneja leciono kun 5 Esperanto-profesiaj instruistoj, en iuj estas instruado kiel amuza leciono.
9.4, Instruado de Esperanto sur interreto estas tre populara okazo por komencantoj, eĉ IKEF-CN varbis pli 300 kursanojn unufoje. Sed lernantoj kaj studentoj kutime lernas per Duolingo per la angla lingvo. Ŝajne ne mankas junaj Esp-interesantoj en Ĉinio.
9,5, Videa kunvenado aktivas Esperante. Ĉiusemajne po 2 horoj la sabata forumo jam okazis 153 fojojn kaj dimanĉa kunveno de IKEF 155 fojojn. Ankaŭ ILEI regule havas…
9,6, Kiel taksi la ĉinan EM, ĉu kvanta aŭ kvalita? Mi supozas ĉ.2000 tra la vasta lando, multaj kluboj malaperis kaj aperis retgrupoj. La Esp-parolanto pli multiĝas kompare.

腾讯会议

搜索 英 16:36 2023/3/25